# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 3 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 3

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## Statistiko de preĝej-vizitintoj en Leipzig

Ni ricevis la sekvantajn informojn de K-do Hans Lindner (iama prezidanto de la loka grupo Leipzig de "Verband für Freidenkertum und Feuerbestattung"). La informoj estas tre interesaj kaj ĝis nun ne publikigitaj.

Je la 16-a de oktobro 1927 la estraro de Leipzig de "Verband für Freidenkertum und Feuerbestattung" (Asocio por Liberpensado kaj Kremacio) aranĝis ĝeneralan statistikon pri la preĝej-vizitintoj, kiu rezultigis strangan bildon pri la vizito de la kristanaj preĝejoj. Laŭ la rezultoj oni komprenas, ke la eklezio provas plialtigi la nombron de la preĝejvizitantoj per diversaj rimedoj kiel filmprezentado kaj aliaj reklammetodoj, eĉ per minaco ne plu peti pri bela vetero, ĝis la vizito pliboniĝos. Samtempe tiu statistiko donas interesan bildon pri loĝmizero; oni konstatas, ke estas miloj da familioj en Leipzig kaj en la tuta regno, kiuj devas "vivi" kvinope, sesope kaj pli kune en unu ĉambro. Ankaŭ de tiu vidpunkto ni konsideru la senutile starantajn "sanktajn halojn" por pli rapide dedukti la ĝustajn konsekvencojn. Bedaŭrinde ne povis esti farata en jaro 1928 la planita ripeto de tiu statistiko (ĝi certe ebligus interesajn komparojn), ĉar ĉiuj iamaj kunlaborantoj (kelkaj centoj), pioniroj de la liberpensa movado, kiel funkciuloj estas eksigitaj de la ĉef- kaj distriktestraro.

Laŭ oficialaj statistikoj apartenas en Leipzig proksimume 540 000 loĝantoj al la diversaj eklezioj — evangeliaj, katolikaj, protestantaj, sektaj. Proksimume 100 000 loĝantoj eksiĝis el la eklezio. Nia statistiko pri preĝej-vizitintoj farita en supra dato montris por ĉiuj Leipzigaj preĝejoj la sekvantan rezulton:

| | Evangel. k reform. | Katolikaj | Sektaj preĝejoj |
|---|---|---|---|
| Viroj | 1496 | 344 | 557 |
| Virinoj | 2810 | 631 | 712 |
| | 4306 | 975 | 1269 plenkreskuloj |
| Infanoj | 1006 | 271 | 144 infanoj |
| Sume | 5312 | 1246 | 1413 |

El tiuj nombroj ni povas legi kelkajn ne malatentindajn faktojn. 1. En la evang. kaj en la katolikaj preĝejoj la nombro de la virinoj estas duoble pli granda ol tiu de la viroj. En la sektaj preĝejoj la nombro de la viroj tre proksimiĝas al la nombro de la virinoj. 2. En la evang. kaj katol. preĝejoj oni nombras po kvar plenkreskuloj unu infanon, en la sektaj kontraŭe po 9 plenkreskuloj unu infanon. El tio ni povas ekkoni, kie ni devas komenci labori. La sumo de ĉiuj vizitintoj estis 7971. Tio signifas rilate al la sumo de la eklezianoj en Leipzig tre modestan elcenton, nome 1,47. Ne povas esti fiera la eklezio pri tia rezulto, kaj ni komprenas ĝiajn zorgojn. Ankaŭ la rigardo, kiun faris pastro "de supre malsupren" en la "plenigita" preĝejo, memorigas do pri la vorto "kaj vidu, ĉio estis dezerta kaj malplena" (el la rakonto pri la kreo de l' mondo), sed ne pri la "ĉion ampleksanta granda eklezio". Se ni la tutan spacon de la preĝejoj laŭ tri grupoj, kalkulas, ni ricevas meznombre 800 sidlokojn por unu preĝejo el la evang. kaj katol. preĝejoj, dum la pli malgrandaj kunvenejoj de la sektanoj meznombre nur havas 400 sidlokojn. Laŭ la vizito je la 16. 10. 1927 estis okupitaj en la evang. preĝejoj nur kvinono, en la katol. preĝejoj triono kaj en la sektaj nur duono de la ekzistanta spaco. Malgraŭ tiuj ĉi faktoj estas konstruataj preĝejoj kaj kapeloj. En la ĉefepiskopa teritorio de Bamberg (Bavario) estas konstruitaj ne pli ol 45 novaj preĝejoj kaj kapeloj (de 1919). Sed por ebligi al homoj vivi en homindaj restejoj, ne estas aŭ nur malgrandaj sumoj da mono. Por homoj oni konsideras eksbovinejojn sufiĉe taŭgaj por servi kiel homa loĝejo (kiel en Dortmund), eble oni bezonas tie la monon por konstrui novajn bovinejojn. Por Prusio (kiam por Germanio?) minacas nova eklezia Kontrakto, per kiu novaj milionoj estas ĵetataj en la faŭkon de la nesatigebla eklezio.

Kiam ekkonos la klaskonscia Laboristaro, ke ĝi per sia membreco en la eklezio nutras danĝeran malamikon je sia brusto? La klaskonscia Laboristaro devas plenumi ankoraŭ grandegan taskon; ĝia grandeco ne povas nin timigi; ĝi donos al ni forton streĉi ĉiun fibron ĝis finvenko. Sed "la liberigo de l' Laboristaro povas esti nur la verko de la laboristoj mem" valoras ankaŭ ĉisence. Kaj pro tio senlaca batalo kontraŭ la mallumaj potencoj.

**Preseraro.** En "S-ulo" n-o 227 sur nia "L. P." estas komposteraro. La frazo "Esperanto k libera penso" (sur 3-a kolono kun dikaj literoj) ne estas titolo de nova artikolo sed devas sekvi kun ordinaraj literoj post la vorto: Kremacio.

## El la vivo de Siberiaj liberpensuloj

Monatoj decembro kaj januaro estas la plej festriĉaj por eklezianoj. Aktivularo de Sendiula unuiĝo en vilaĝego Isil-Kul (Siberio) decidis utiligi la periodon por sia kontraŭdia agado. En unu el la festotagoj religiaj ili aranĝis lekcion pri la temo: "Vero pri kristo kaj kristanismo". Al ĉiuj religiaj societoj kaj lokaj ligoj, kiuj estas ĉi tie 16, estis senditaj proponoj viziti la lekcion, post kiu okazos diskuto. Antaŭ la komenco, la klubo, en kiu estis aranĝata la lekcio kaj diskuto, estis plenplena da homoj. Iniciatintoj de la lekcio supozis, ke sufiĉas ejo por 400 homoj, sed alvenis ĉ. 1000. Por ke ĉiuj povu aŭskulti en la ejo, la publiko postulis: "Forportu benkojn kaj seĝojn el la halo, tiam ni ĉiuj povos enesti kaj aŭskulti." Finfine ĉiuj trankviliĝis kaj komenciĝis la lekcio. La oratoro iom post iom laŭ scienc-doktrinoj klarigis la tutan miton pri kristo. Fine de lia lekcio estis brua aplaŭdo. Post li sur la tribuno aperis unu el la pastroj. Kun kaŝita ruzo, intencante, videble, ektuŝi sentojn de l' publiko, li, levinte supren siajn brakojn, komencis parolon per vortoj: "Benu min dio"... Tamen lia parolo, simila al kutima preĝeja prediko, nenion novan pruvis. Li ne povis refuti sciencajn doktrinojn... Poste parolis kelkaj sektanoj, kun la sama rezulto. Sume en la diskuto partoprenis 18 oratoroj. Tre interesa estis momentoj, kiam en la diskuto parolis laboristoj. Simplaj paroloj iliaj, plenaj de ekzemploj el pasinteco, pri pastra fiagado dum mond- kaj civitana militoj kaj dum Kolĉak-regado en Siberio, tute disbatis kaj refutis religiajn dogmojn de dioservantoj kaj Sektanoj. La lastaj nenion kontraŭdiris tiujn parolojn. Pli ol kvin horojn daŭris la lekcio kaj diskuto, tamen la ĉeestantoj estis tiom interesitaj, ke neniu forlasis la halon de la klubo antaŭ fino. En tiu tago la Sendiularo de Isil-Kul ankoraŭfoje venkis kaj altiris sian flankon multajn personojn.

SAT-ano 3930 (Kurgan).

**Sukcesigu la aferon!** La 20-an de majo okazos Tutsovetia Ateista Kongreso. Estos aranĝata granda ekspozicio kontraŭreligia kun speciala fako "Esperanto je la servo de religiuloj k ateistoj". Por la fako la Sekcio de Sovetiaj ateistoj-esperantistoj bezonas taŭgan materialon esperantan: gazetojn, ĵurnalojn, librojn, flugfoliojn, insignojn, ilustraĵojn ktp., eldonitajn ĉu de religiuloj, ĉu de liberpensuloj. Ni en Sovetio nenion tiurilatan havas. Sendu por sukcesigi la aferon k poste ĉion enmuzeigi. Sendu en fermitaj kovertoj aŭ pakaĵoj, ĉar pri religian materialon, ni ne ricevos alimaniere. La adreso: Moskvo 19, Znamenka 18, MK SEU por Ateista Sekcio.

N. Incertov.

## NIA POŜTO

**13 394.** — Artikolo tro longa por "L. P."; mi sendis ĝin Moskvo.

**3930.** — Karton ricevis.

**2798.** — Por vi alvenis libroj el Moskvo; la elspezoj por transsendo estas proks. 5 gmk.; do sendu monon. — Individuaj leteroj ne estas respondataj pro tempomanko k poŝtelspezoj.

### La gazetservo

funkcias. Nia bulteno aperas ĉiudusemajne. Ĉiu sekciano subtenu nian entreprenon mone. K-do Klaps (adreso vidu sube) akceptos ĉiun sumon.